Esperanto servu pacon

# A K T U A L E

Monata informilo de Sovetunia Esperantista Junulara Movado

N= 6 (10) junio 1974

## Proksimuma plano de la VIII-a Konferenco de SEJM-Konsilantars

La unua tago - 16.07.74.

Matene : Veno kaj registriĝo de la konferencanoj.
Posttagmeze : Malfermo.Enkonduka parolo de A.Gončarov.
Raportoj de lokaj kluboj.
Vespere : Libertribuna disputo.

La dua tago - 17.07.74.

Matene : Raprtoj de la lokaj kluboj.
Posttagmeze : Interna kluba vivo (strukturo,kunvenoj,gvidado,financoj ktp.)
Lab oro kun progresantoj.
Vespere : Disputo "Kiun k lubon vi povas nomi modela?"

La tria tago - 18.07.74.

Matene : Faka agado en SEJM.Raportoj de V.Laptev kaj de la fakestroj.
Informado en SEJM ("Aktuale","Akordo",KKK ktp)
Posttagmeze : Financaj aferoj.Raporto de A.Vizgirdas.
Lernejaj aferoj.Raporto de N.Starodubcev.
Rilatoj kun oficialaj instancoj.Raporto de V.Arolović,kun raporto de B.Kolker,lokaj sciigoj.
Vespere : Disputo "Kiel fari nian programon konforma al la nuntempo?"

La kvara tago - 19.07.74.

Matene : Eksterlandaj rilatoj de SEJM.Raporto de D,Cibulevskij.
Internacia korespondado kiel grava formo de E-laboro.
Posttagmeze : Someraj aranĝoj (SEJT,ESKT) kaj ilia perspektivo.
Programo de SEJT-16.
Regionaj kaj aliĝaj renkontiĝoj,ilia organizo.
Vespere : Disputo "Ĉu devas SEJM plenumi funkciojn de ĝenerala landa movado?"

La kvina tago - 20.07.74.

Matene : Problemo de aĝo en SEJM.Propono pri fondo de SEM,eventualaj formoj kaj manieroj de ĝia realigo.
Esperanto kaj scienco.
Posttagmeze : Sekretariaj aferoj.Raporto de V.Ŝilas.
Rezultoj de la socialisma konkurado.Akcepto de novaj grupoj al SEJM kaj punrimedoj kontraŭ la malaktivaj.
Elektado de nova Komitato kaj fakestroj.Ŝanĝoj en la Regulаro kaj Taksa demandaro.Akcepto de decidoj.
Fermo de la Konferenco.
Vespere : Disputo "Kio estas disciplino en SEJM?"

La sesa tago - 21.07.74.

Matene : Kunsido de la nova Komitato.
Vespere : Laŭ la programo de SEJT-XVI.

Ĉiuj klubestroj estas petataj prepari hejme krom 5-minutaj raportoj pri la agado ankaŭ kelkminutajn raportojn pri la temoj:
a)internaciaj kontaktoj;
b)rilato de lokaj instancoj al Esperanto;
c)faka laboro;
d)E-laboro en lernejo.

Laŭ la komisio de la Komitato kompilis unua vicprezidanto de SEJM V.Arolevič, Moskvo.

Programo de la SEJT-XVI.

La 21.07.74.

| Tempo | I-a programo | II-a programo |
|---|---|---|
| 8-9 | | |
| 9-10 | A L V E N O  K A J  R E G I S T R I Ĝ O | |
| 10-11 | | |
| 11-12 | | |
| 13-14 | | |
| 14-15 | | |
| 15-16 | | |
| 16-17 | M A L F E R M O  D E  L A  S E J T - X V I | |
| 17-18 | organiza kunveno de parolantoj | organiza kunveno de progresantoj |
| 18-19 | | |
| 19-20 | | |
| 20-21 | | |
| 21-22 | I N T E R K O N A  V E S P E R O | |
| 22-23 | | |

La 22.07.74.

| Tempo | I-a programo | II-a programo |
|---|---|---|
| 7-8 | | |
| 8-9 | | |
| 9-10 | | |
| 10-11 | E-Universitato | Paroliga kurso |
| 11-12 | | |
| 12-13 | Somera Universitato | Instruo de kantoj E-legejo |
| 13-14 | | |
| 14-15 | | |
| 15-16 | | |
| 16-17 | Tradukista kurso | |
| 17-18 | Viktorino | Paroliga kurso<br>E-ludoj por progresantoj<br>Pedagogia seminario |
| 18-19 | | |
| 19-20 | | |
| 20-21 | R E G I O N A J  K U N V E N O J | |
| 21-22 | | |
| 22-23 | D A N C O J | |

La 23.07.74.

| Tempo | I-a programo | II-a programo |
|---|---|---|
| 7-8 | | |
| 8-9 | | |
| 9-10 | | |
| 10-11 | E-Universitato | Paroliga kurso |
| 11-12 | | |
| 12-13 | Somera Universitato | Instruo de kantoj E-legejo |
| 13-14 | | |
| 14-15 | | |
| 15-16 | | |
| 16-17 | Tradukista kurso | Paroliga kurso<br>Konkurso de vort-sciantoj |

| | | |
|---|---|---|
| 17-18 | Konkurso de interpretistoj | Pedagogia seminario |
| 18-19 | Diskutklubo | |
| 19-20 | | |
| 20-21 | F E S T O D E N A S K I Ĝ I N T O J | |
| 21-22 | -"- | |
| 22-23 | | |

La 24.07.74.

| | | |
|---|---|---|
| 9-10 | E-Universitato | Paroliga kurso |
| 10-11 | -"- | -"- |
| 11-12 | Somera Universit ato | Instruo de kantoj |
| 12-13 | -"- | Pedagogia seminario |
| 13-14 | | |
| 14-15 | | |
| 15-16 | Tradukista kurso | Paroliga kurso |
| 16-17 | -"- | Pedagogia seminario |
| 17-18 | S P O R T A J K O N K U R O J | |
| 18-19 | -"- | |
| 19-20 | | |
| 20-21 | K O N C E R T O | |
| 21-22 | -"- | |
| 22-23 | | |

La 25.07.74.

| | | |
|---|---|---|
| 9-10 | E-Universitato | Paroliga kurso |
| 10-11 | -"- | -"- |
| 11-12 | Somera Universitato | E-legejo |
| 12-13 | -"- | -"- |
| 13-14 | | |
| 14-15 | | |
| 15-16 | Tradukista kurso | Paroliga kurso |
| 16-17 | -"- | Prelego(rusl)por progresantoj |
| 17-18 | Fakaj kunvenoj | |
| 18-19 | | |
| 19-20 | | |
| 20-21 | G A J A V E S P E R O | |
| 21-22 | - " - | |
| 22-23 | | |

La 26.07.74.

| | | |
|---|---|---|
| 9-10 | E-Universitato | Paroliga kurso |
| 10-11 | -"- | -"- |
| 11-12 | Somera Universitato | Instruo de kantoj |
| 12-13 | -"- | E-legejo |
| 13-14 | | |
| 14-15 | | |
| 15-16 | Tradukista kurso | Pedagogia seminario |
| 16-17 | N E P T U N - F E S T O | |
| 17-18 | - " - | |
| 18-19 | - " - | |
| 19-20 | | |
| 20-21 | K O N C E R T O | |
| 21-22 | - " - | |
| 22-23 | | |

La 27.07.74.

| | | |
|---|---|---|
| 7-8 | F I Ŝ K A P T I S T A K O N K U R S O | |
| 8-9 | - " - | |
| 9 -10 | - " - | |

| | | |
|---|---|---|
| 10-11 | | |
| 11-12 | | |
| 12-13 | | |
| 13-14 | | |
| 14-15 | Šipekskurso | |
| 15-16 | -"- | |
| 16-17 | | |
| 17-18 | | |
| 18-19 | Diskutklubo | |
| 19-20 | | |
| 20-21 | K G S | |
| 21-22 | -"- | |
| 22-23 | | |

La 28.07.74.

| | | |
|---|---|---|
| 9-10 | E-Universitato | Paroliga kurso |
| 10-11 | -"- | -"- |
| 11-12 | Pedagogia seminario | Instruo de kantoj |
| 12-13 | Somera Universitato | Prelego(rusk)por progresantoj |
| 13-14 | | |
| 14-15 | | |
| 15-16 | Tradukista kurso | Paroliga kurso |
| 16-17 | -"- | |
| 17-18 | KOMUNA KAJ GRUPAJ FOTADOJ | |
| 18-19 | -"- | |
| 19-20 | | |
| 20-21 | K O N C E R T O | |
| 21-22 | -"- | |
| 22-23 | | |

La 29.07.74.

| | | |
|---|---|---|
| 9-10 | E-Universitato | Paroliga kurso |
| 10-11 | -"- | -"- |
| 11-12 | Somera Universitato | Instruo de kantoj |
| 12-13 | -"- | |
| 13-14 | | |
| 14-15 | | |
| 15-16 | Konkurso de tradukistoj | Bela lego(konkurso) |
| 16-17 | E-legejo | |
| 17-18 | -"- | |
| 18-19 | M I T I N G O | |
| 19-20 | | |
| 20-21 | Poezia vespero | |
| 21-22 | -"- | |
| 22-23 | | |

La 30.07.74.

| | | |
|---|---|---|
| 9-10 | E-Universitato | Paroliga kurso |
| 10-11 | ekzamenoj | ekzamenoj |
| 11-12 | -"- | -"- |
| 12-13 | S O L E N A F E R M O | |
| 13-14 | | |
| 14-15 | | |
| 15-16 | L O T E R I O | |
| 16-17 | -"- | |
| 17-18 | (kunveno de klubestroj) | |

18-19
19-20
20-21 M A S K O - B A L O
21-22 (adiaŭa)
22-23 Komuna koncerto
23-24

En la plano povas okazi negrandaj ŝanĝoj.

Klubestroj, atenton

Estas la tempo

Mi esperas, ke la raportoj pri la agado (periodo 1.1.1974 - - 30.VI.1974) baldaŭ finpretos. Se ne eblas, ke la raportoj atingu min ĝis la 13-a de julio, kunprenu ilin al la Konferenco.

La Konferencon venu kun 3-5 minuta ŝaparolota raporto. Jen ĝia enhavo:

1. La familinomo kaj nomo de la raportanto. 2. Kiu E-klubo. 3. Posteno de la raportanto(en la klubo). 4. Kiu estas la prezidanto. 5. Kiom da membroj entute estas, 6. Kiom da partoprenas la Konferencon, partoprenos SEJT-on. 7. La plej gravaj atingoj en la 1973-74 agadjaro (nur nomi). 8. Ĉefaj malfacilaĵoj. 9. Perspektivoj por plia aktivado de la klubo. 10. Kiu estas SEJM-Reprezentanto en la 1974-75 agadjaro.

Se neniu el "sankta" triopo: la kluba prezidanto, sekretario, SEJM-Reprezentanto - povos veni la Konferencon, rajtigu paroli aliun. En la plej malbona okazo sendu ankaŭ tiun raporton al mi.

Ĝis la revido, tamen.

Sekretario de SEJM-Konsilantaro V. Ŝilas, Vilnius

Prenu kun vi al la SEJT-XVI

1. Valorajn librojn por la E-legejo de E-Universitato(vidu "A" N=2(6)p.13).
2. Superfluajn E-librojn por la tendaraj loterio kaj butiko.
3. Ekspoziciojn (albumojn) ligitajn al Esperanto aŭ kolektitajn kun helpo de E-to.
4. Superfluajn fotojn pri la pasintaj tendaroj por tendaraj fotoalbumoj.
5. Novajn E-kantojn. Skribu la tekston sur grandan paperfolion (de formato N=24(594·841).
6. La plej interesajn murgazetojn por la ekspozicio de klubaj murgazetoj.
7. Dikajn kajerojn por enskribi lekciojn de la E-Universitato, paroliga aŭ tradukista kursoj.
8. Kluban donacon-suveniron por la tendar-organizantoj.
9. Tradukitan tekston por la tradukista konkurso.
10. Fiŝhokojn kun la konvena fadeno kunprenu tiuj, kiuj partoprenos la fiŝkaptistan konkurson.
11. Kostumojn por la maskobalo.
12. Varmajn vestojn.
13. Kolorajn lumbildojn(slajdojn) pri E-temoj.
14. Artikolojn pri la pasinta SEJT por la ĵurnalista konkurso.
15. Ne forgesu skribilojn.

Ĉi artikolon oni legu dum la kluba kunveno kaj dividu kiu klubano kion prenos.

Pri SEJM - SEM problemo

Mi partoprenis Ignalinan boatmarŝon. Tie okazis seminario, kie ni priparolis kelkajn demandojn.

Kaj jen kion mi pensas. Inter kunflugintoj estis vera verda junularo. Mi ne eraros, se diros, ke nur ĉirkaŭ 5 homoj estis pli

aĝaj ol 30 j.Kompreneble,al pli junaj,kiuj havas iom pli ol 20,ĉia afero estas same malproksima,kiel stela ĉielo.Por mi estas iom strange,ke ili devas decidi kion fari kun ni,kiuj havas pli ol 30.

Nemkompreneble estas,ke la komitato devas juniĝi kaj post unu,du,tri jaroj tie restos nur vere junaj(kiel diris Geitin:"Laŭ pasporto,sed ne nur laŭ animo").

Do,restas "sen laboro" Gonĉarov,Ŝilas,Vizgirdas,venos tempo - Arolović.

Sed samtempe ni debatas "ĉu SEJM,ĉu SEM(aŭ,kiel ŝerco,SEMM - sovetlanda E-movado de maljunuloj).

Eble tamen jam venis tempo,kiam ni povas diri:kaj SEJM kaj SEM?Ni povas ne rapidi,sed post du3 jaroj tiu demando jam fariĝos akra.

Estis tempo,kiam aktiva junularo kunigis laboron de junularaj kluboj,kaj nuna raporto(la lasta)de Ŝilas estas sufiĉe interesa.Tiam ekzisitis aŭ junularo,aŭ laŭ mia opinio - "maljunuloj".Sed nun ekzistas mezaĝuloj,estinta junularo.Ili kunlaboras jam kaj kun junularo,kaj kun "aĝuloj".Eble ni komencu po-iomete kunlaboron de "aĝaj" kluboj?Kun simila poentaro,ekzemple?Kun simila al "Akordo" eldono?Ĉar tiam,se venos tempo por oficialiĝo,ni estos pretaj.Kvankam oni parolas,ke "sed,se oni denove malpermesos?"Do,ĉu sidi kaj atendi?Des pli dum la lasta SEJT ni parolis pri socia instituto.Kompreneble gvidos ĝin pli aĝaj homoj,kaj junularo kunlaboros.

Certe,tuj "ekstaras" demando ĉu pri konferencoj de SEM,ĉu pri alia formo.Sed tamen ni devas koni unu la alian kaj memori,ke ekzistas mezaĝuloj,an kaŭ komencantoj,ke tiuj mezaĝuloj ankaŭ kapablas labori kaj povas esti utilaj,ĉar ili estas jam homoj,havantaj vivo-sperton kaj ian lokon sur la socia ŝtuparo.

Povas esti,ke mi eraras,fantazias.Sed kion fari.

V.Cvetkova,Leningrad

## Eviti miskomprenojn

La proksimiĝanta SEJT-XVI igas min turni la atenton de nia aktivularo al unu demando,kiu malgraŭ sia ŝajna bagateleco,postulas solvon..

Temas pri du gravaj tendaraj aranĝoj.Unu estas la tradicia Somera Univwrsitato(plue en la teksto mallongigota je SU),alia - la novlanĉita Esperanto-Universitato(plue - EU).La funkcioj de tiuj ĉi du eroj de la programo klare diferencas,sed la nomoj estas bedaŭrinde simil.aj.Kiel tio povis okazi?De kie aperis tiel nomata EU,se en SEJT-XV ĉiuj konis ĝin sub la nomo "Primovada lernejo"?Se ni foliumos la antaŭajn numerojn de "Aktuale",ni povos legi ,ke tion ni ŝuldas al iu mita decido de Komitato,ĉu de Konsilantaro.Tiuj asertoj estas tutsimple malveraj,fakte la nomo EU estas trudita al la esperantistaro "en laboŕa ordo",sed ne tio gravas.Nun ni staras antaŭ fakto,ke ekzisto de facile konfuzeblaj nomoj EU kaj SU ĉiam povas kaŭzi nenecesajn miskomprenojn.

Eble iuj ĵuj oponos:pro kio do oni miksos - unu Universitato estas somera,alia Esperanta,ĉio estas klara...Tia argumento ne konvinkas,ĉar ankaŭ SU certe estas Esperanta,kaj ankaŭ EU estas ja somera.Kaj finfine,kriterio de vero estas la praktiko,kiu montras,ke miskomprenoj jam okazas.El la artikolo de N.Cvilemeva("Aktuale",N=3)sekvas,ke partoprenintoj de REVU en Miass malĝuste komprenis la cirkuleron de A.Gonĉarov kaj anstataŭ pridiskuti programon de EU proponis titolojn de prelegoj por SU.Min mem antaŭnelonge unu aktivulo demandis pri SU;mia respondo lin ne kontentigis,kaj poste evidentiĝis,ke fakte lin interesis EU...

Estas klare:por ke tiaj okazoj ne ripetiĝu,por ke la ten-

daranoj povu senembarase orientiĝi en la programo de SEJT, ni devas likvidi la erarprovokan koincion. Nature eblas du manieroj por tio.

Ni povus konservi la nomon SU, kiu estas delonge enradikiĝinta kaj kongruas kun simila aranĝo dum Universalaj kongresoj. Tiuokaze EU ricevu alian, pli modestan nomon. La denaska "Primovada lernejo" ne plene respegulas ĝiajn funkciojn, do eblus rebapti ĝin je pli ĝenerala "Lernejo de aktivulo" aŭ io simila.

Tamen EU pli ol SU respondas al la ĝenerala nocio de universitato kiel studa centro, kie oni ne nur prelegas, sed ankaŭ kontrolas sciojn de studantoj kaj enmanigas diplomojn al ili. Pro tio alia vojo - restigi la nomon EU - ŝajnas pli trafa. Se estos tiel, alian nomon devas ricevi SU. En la tendaro Bultono N-ŝ ĝi estas menciita kiel "scienc-popularaj prelegoj", sed certe eblas elpensi ion pli interesan.

Do ni bezonas nur adopti pli konvenan nomon por SU aŭ por EU kaj okazi ĝin jam ĉi-somere. Por nia movado, plurfoje manifestinta eltrovemon eĉn diversaj pli ĝenaj situacioj, tio ne devas esti tro malfacila tasko.

V. Arloviĉ, Moskvo

## Pri UEJM

Mi volas prirakonti iomete la nebrilan situacion en UEJM, rezulte de kio nun (ĉi-somere) eĉ ne okazis renkontiĝo de ukrainaj esperantistoj. Ĝi estis planita por ĉi somero en Slavjanogorsk, kaj tion proponis ĝuste ĥarkovanoj. Sed en majo la ĥarkovanoj proponis antaŭe sian viziton al Zaporoĵje kaj poste kun doneckanoj ili proponis ĝian transmeton en tut-ukrainian renkontiĝon (anstataŭ la planita en Slavjanogorsk???). La renkontiĝo en Zaporoĵje malebliĝis pro enkolĥozado de la ĉefa organizanto V. Rjabokonj. Sed pri Slavjanogorsk neniu eĉ rememoris. Por kio do decidi, voĉdoni?.. La situacio tre bone respegulas la staton de aferoj en UEJM. Oni kunvenas, babilas unufoje en jaro kaj poste ... forgesas.

Ĝenerale UEJM ekde sia apero en 1969 ŝajnas, miaopinie, je mortnaskito. Ĝi laŭnome pretendas esti iu aparta enlanda "movado", sed eĉ ne estas plenvalora parto de la tutlanda movado (SEJM).

Al mi ŝajnas, ke la ĉefa kaŭzo de tiu situacio estas manko de aktuala intergrupa informados. Ekzemple, ni en Zaporoĵje pro la malsukcesinta kunvoko de la renkontiĝo, tamen finfine ekscitis, ke estas esperantistoj kaj eĉ grupoj en Pavlodar, Nikolajev (?) kaj eĉ de io okazas en... Kievo, kvankam N. Starodubcev povus diskonigi tiujn faktojn jam delonge. Estis decidoj fondi regulajn informilojn (elmenaŭ simile al KKK), en kiuj informi pri novaĵoj en lokaj grupoj. Fakte, tion devis fari N. Starodubcev, ĉar li havas teknikajn rimedojn kaj sufiĉan informitecon. Sed oni parolis, decidis kaj ... forgesis.

Kaj do jen klariĝis interesa fakto: la najbara Dnepropetrovska provinco havas esperantistojn kaj eĉ grupojn en preskaŭ ĉiuj siaj urboj: en Dnepropetrovsk mem, en Krivoj Rog, Novomoskovsk, Pavlograd, Nikopol, kaj ili eĉ mem ne scias unu pri la alia.

Por iel ripari tion, necesas ne kunveni kaj fari novajn decidojn, sed plenumi jam akceptitajn i. a. aperigi elmenaŭ provnumeron de ukraina intergrupa informilo. Kiel ni en Zaporoĵje povas kunvoki renkontiĝon, se ni eĉ ne havas aktualan adresaron, povas esti ke ĝi troviĝas ĉe N. Starodubcev persone?

Nun ŝion komencis anonci Ĥarkovo kaj Donecko, eĉ ne donante al ni la adresaron.

Ni supozas, ke la tut-ukrajniaj kunvenoj estu ne printempe nek somere, sed en aŭgusto aŭ septembro, ne improvizitaj, sed solide preparitaj por eviti mankojn, pri kiuj temis en la lasta

"Aktuale".

D.Kolker, Zaporoĵje

**Pri krokodiloj, SEJM kaj SEM**

En la lastaj kajeroj de "A" kaj dum renkontiĝoj de esperantistoj oni akre diskutas pri SEJT aŭ SET, SEJM aŭ SEM.

Fakte la problemoj estis gravaj. "Aktuale" estas vera tribuno por akraj problemoj, sed, al mi ŝajnas, ke en tiuj diskutoj oni forgesas pri nia ĉefa celo: la disvastiĝo de Esperanto, propagando de ĝiaj celoj.

Multaj instruistoj de Esperanto spertis tiun okazon: komencas la kurson 20 homoj, sukcese finas 5 kaj ekaktivas en E-movado du aŭ eĉ unu.

Ĉu klopodoj de la instruinto estis vanaj? Tute ne, ĉar tiuj 18-19 el la vizitintoj ekscilis pri Esperanto, ili en la maniero propagandos inter loĝantaro Esperanton.

En tendarojn por komencantoj, se ili realiĝus, oni devas altiri aktivajn amikojn de Esperanto (eĉ neesperantistojn) por ke ili komprenu la spiriton de Esperantujo kaj poste povu propagandi nian lingvon amatan.

Tamete oni devas diri pri krokodiloj. Certe krokodiloj estas maldezirindaj en Esperantujo. Kaŭzojnde krokodilado estas jenaj: 1) malperfekta kono de la lingvo, 2) ankoraŭ Lomonosov diris ke oni parolu germane kun amatino, itale kun fraŭlinoj, sed ruse oni povas paroli kun ĉiuj.

Ĉu ni forpelu entute inter geesperantistoj nian gepatran lingvon (ekzemple la rusan)? Ĉu per forpelo de la gepatra lingvo ne forpelos ni de Esperanto amikojn de Esperanto?

Tion mi skribas, certe, ne por defendo de krokodiloj, tute ne. Sed la problemo de krokodiloj restas malgraŭ klopodoj de verda polico dum la tendaroj.

Ni, esperantistoj, ne forgesu pri tio, ke ni loĝas ne en utopia Esperantujo, sed en konkreta medio, kaj laboro en tiu medio estu dediĉata al disvolviĝo de nia amata lingvo.

I.Korolev, Bijsk

**S C I I G O J          S C I I G O J          S C I I G O J**

En Alma-Ata estas produktotaj novaj E-insignoj. Unu el la specimenoj estas ronda, 22 mm en diametro. Meze de la rondo troviĝas granda verda stelo kun la litero "E" en la centro. Sur la randa strio de la insigno estas skribita la vorto "Esperanto": supre en Esperanto, malsupre en la rusa.

La proksimuma kosto estas 15 kp. La unuaj insignoj aperos fine de junio. Aliaj du aŭ tri specimenoj aperos nur, se la vendado de la unua sukcesos. La insignoj verŝajne estos mendeblaj el ĉiuj urboj. Se ilin mendos vendoorganizaĵoj, certe sendokostoj ne estos. Ceteraj organizaĵoj povas mendi la insignojn laŭ jena adreso: Alma-Ata, Krasnogvardejskij trakt 207, Fabrika "Suvenir". Direktoro Ĉekmenjov Konstantin Fedoroviĉ.

G.Gercikov, Talgar

En Novomoskovsk post la fino de E-kurso estas fondita E-societo, kiu konsistas el 15 geesperantistoj.

Kun helpo de urba komitato de komsomolo ni planas plu disvastigi Esperanton en nia urbo. Certe, mi kun kelkaj miaj komencantoj estos partoprenantaj la SEJT-XVI.

A.Kuprienko, Novomoskovsk

Ĉiujn, ĉiujn, ĉiujn

Aŭskulto Redin

Prenis du volumojn de "Historio de Esperanto" el Leningrada kluba biblioteko kaj ne redonas. Ĉiu, kiu ilin konas sciu pri tiu fakto.

D.Lukjanec, Leningrad

Laŭ la lastaj sciigoj oni povas veni al la tendaro sen anticipa pago. Oni pagos surloke po 3 rb por la tago plus aliĝkotizo.

## De la redakcio

Pasis rezultoriĉa posttendara jaro. Ĉiuj eventoj, sukcesoj, disputindaj demandoj trovis respegulon sur la paĝoj de "Aktuale". La materialoj en nia interkomunikilo abundis. Inter ili estis tiel informoj kiel problemoj. Iuj aŭtoroj eble eĉ la unuan fojon en la vivo skribis artikoleton por publikigo en la similan organon.

En la abundo de materialoj estis perfektaj artikoloj, estis ne plene fortaj... Dum la tendara tempo komisiono el spertaj fidindaj homoj atente trarigardos la tutan materialon kaj anoncos la plej bonan artikolon. Estos atentataj graveco de la enhavo, la stilo, foresto de "akvo" ktp. La aŭtoro de la "ideala" artikolo estos premiata de la redakcio.

V.Ebel, redaktoro de "Aktuale"

Materialojn por "Aktuale" sendu laŭ la adreso: 684099, Barnaul-99
a.k.11, Esperanto-klubo

Redaktis V.Ebel,
tajpis M.Stolbun